

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2011



*Dum la Universala Kongreso en Kopenhago, tri grandaj banderoloj estis al kroĉitaj en diversaj lokoj de la urbo, kaj restis kelkajn tagojn. Raportoj pri la UK p. 6–10. (Foto: Paula Niinikorpi)*

## **Jorma Ahomäki elstara aganto, p. 17**

**Someraj raportoj: ♦ Hispanio, p. 4 ♦ Valamo & Naantali, p. 11  
Blinduloj en Olomouc, p. 13 ♦ Rikoltoj de Kopenhago, p. 16**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

*Jukka Nikoskelainen*, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi

*Markus Sunela*, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 ✉ markus.sunela@iki.fi

*Keith (Keke) Uber*, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith\_uber@yahoo.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Officejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet:** <http://www.esperanto.fi>



## Kolektiĝas pacaj batalantoj

La plej populara ero en solena malfermo de niaj Universalaj Kongresoj estas la salutoj de ĉiuj partoprenantaj landoj. En la 96-a UK en Kopenhago unu estis aparte impresa. La

representantino de Norvegio ne regis sian emocion adresante en sia saluto al la kongresanaro devizon, ke malamo estas sensenca, ke amo ĝin supervenkas. La kongresanoj ekstaris por honorigi memoron de la viktimoj en la terortakoj en Norvegio du tagojn antaŭe.

Tio memorigis pri la 80-a UK en Tampere en 1995, kie kongresano el Sarajevo estis aklande akceptita. Li sukcesis trapasi la sieĝon de la urbo meze de la dispeciga milito de Jugoslavio. Kaj pri la 10-a UK de 1914 en Parizo ne okazinta pro militdeklaro, kaj majstro Zamenhof faris kontraŭvolan vojaĝon tra Finnlando por eskapi.

La tri kazoj estas tre diferencaj kaj tre similaj. En ĉiu temas pri teroro. Perforto pro ajna motivo estas terorismo. Esperantismo staras en mala flanko.

### Registaro de kompromisoj

Ĉi-loke temis en nia antaŭa numero pri malfacila naskado de respublika registaro post la baloto ŝanĝinta la parlamenton plej radikale de post 1945. Somerkomence, post fiasko de intertraktado de ses partioj el ok ŝajnis probable, ke daŭrigos konstruadon de registara programo alia sesopo aŭ kvinopo, kun partopreno de ankaŭ la "Baza" aŭ "Vera" grupo. Sed tiel ne okazis, tiu furora protesta movado ne emis kompromisi pri sia absoluta *ne* al divido de financokrizaj perdoj en aliaj EU-landoj. Tio estas komprenebla. La "verfinna" movado estas tre malkohera; ĝia eble

sola plene komuna ideo estas kontraŭi Eŭropan Union. Rezultis plua traktado kaj registaro kun konservativa ĉefministro. En opozicio restis la antaŭa ĉefministra partio, la centro, suferinta plej grandan balotan perdon, kaj la "veraj" gajnintaj grandegan venkon. La registara programo promesas garantiojn sub certaj kondiĉoj al EU-landoj en financa krizo kaj pri la unio ĝenerale difinas:

*Eŭropa Unio estas la plej grava influejo de Finnlando en la internacia kunlaboro. Finnlando celas EU:n, kiu estas projekto de paco, kresko, laboro kaj socia justeco. Ĝia membreco kaj ĝia komuneca evoluigo estas intereso de Finnlando. Sendependeco estas partopreni en internacia decidado tie, kie oni faras decidojn koncernantajn Finnlandanojn.*

Nin interesas aparte la lingvopolitika linio. La programo eldiras, ke **la dulingveco de Finnlando estas riĉo kaj forto**. Tio signifas ne tuŝi la konstitucian pozicion de la ŝtataj lingvoj, finna kaj sveda. Estas ankaŭ menciita rajtoj de la leĝe difinitaj enlandaj lingvoj, samea, romaa kaj gesta, kaj menciita, kiel grave estas efike doni enlandan lingvoscion al enmigrintoj. – Plue pri egaleco, la programo deklaras (dikliterigo nia): **Diversaj religioj kaj komunumoj estas valoraj por morala kresko. En Finnlando ĉiuj estas egalrajtaj sendepende de sekso, aĝo, origino, lingvo, religio, konvinko, opinioj, sanstato, handikapeco, seksa orientiĝo aŭ alia persona faktoro. La registaro agas aktive kontraŭ rasismo kaj genocido.**

Ni vidos, kion praktike signifos la programdeklaro, kiun certe ni esperantistoj povas aprobi. En nia numero 1/2011 ni skribis: "La finna lingvo jam fariĝis komuna interlingvo de multaj lingvogrupoj, rolo kiun la finna en la 20-a jarcento nur marĝene havis. La Finnlanda socio fariĝas ĉiam pli internacia. Kio estas maltrankvi- ▷

## Familia renkontiĝo en la suna koro de Hispanio

La 70a Hispana Kongreso de Esperanto okazis de la 28a junio ĝis 3a julio 2011 en Sankta Laŭrenco Eskoriala (San Lorenzo de El Escorial), ĉ. 40 km nordokcidente de la hispana ĉefurbo Madrido. Kvindeko de partoprenantoj, inter ili Renato Corsetti, Kim Henriksen, Georgo Handzlik kaj manpleno da malpli konataj eksterlandanoj, trovis la vojon al tiu familia, etose kaj temperature varma kaj suna renkontiĝo kun la temo "Esperanto 3.0 – Esperanto-agado en la 21a jarcento".

Inter la celoj estis diskuti pri la movado, prezenti novan projekton "Bitlibroj" kaj malpli enuan eblecon prezenti tre diversspecajn sciojn laŭ malpli enua maniero ol per la kutimaj longaj prelegoj, nomita *peĉakuĉo*.

(En la plej kutima formo de foliprezentado

[kontraste al longaj PowerPoint-sesioj] ĉiu de 20 folioj estas montrata dum 20 sekundoj, kio sumiĝas al 6 minutoj kaj 40 sekundoj. Tiel ene de unu horo ĝis ok personoj povas informi pri tre diversaj temoj. La nomo peĉakuĉo venas de la japana vorto por babilo. Komence studentoj de dezajno kaj arkitekturo en Tokio prezentis siajn ideojn, sed dume tiu prezentoformo disvastiĝis tra la tuta mondo, kutime en specialaj vesperoj. Bona planado kaj antaŭa ekzerco zorgas por maksimuma percepto de la kernaj detaloj ĉe la spektantoj.)

La ĉefaj programeroj estis vive dissenditaj per interreto, kie eblis komenti kaj ankoraŭ ricevi impreson de la koncertoj, prezentoj kaj diskutoj sub la adreso <http://livestream.com/70ahi> *spanakongresodeesperanto* (De la diskuto inter

▷ liga en la aktuala diskuto estas, ke la politikistoj havas malmultajn klarajn kaj fortajn ideojn pri la multkultureco. Tian diskuton ni bezonas. Puŝeton al tiu diskuto: Ni kutime parolas pri multkultureco. Tio ne estas reala vivo. Kio vere fariĝas, estas mikskultureco. Tiel ni formiĝas." – Estas dezirinde, ke la registara periodo portos ion konkretan pozitivan en tiu rilato.

Grava financa detalo en la registara programo estas, ke la plej granda ero plialtigi ŝtatajn enspezojn estas batalo kontraŭ preterleĝa "griza" ekonomio: Devigi laborigantojn pagi laŭkontrakte kaj kolekti impostojn. Tio koncernas rekte la internaciigon, tutmondiĝon de Finnlando. Plej ofte eksterlandaj laborantoj estas viktimoj de la ekonomio griza, foje krima – ankaŭ en Finnlando, foje en teruraj ekstretoj.

La programo esprimas iom memfide, ke *la plej bona bazlernejo en la mondo estas plifortigata kiel garantio de egalaj eblecoj*. Tiel, ĉar la

*konkurencpovo de la Finnlanda laboro bazita sur scio kaj kreiveco postulas funkciantan lernejan sistemon*. Aliflanke, laŭdifine *klero estas celo en si mem*.

Pri la eksterlanda politiko estu citita la plej nobla frazo: *Finnlando agas por malpliigo de malriĉeco en la mondo*. Se ni akceptas, ke malriĉo kaj senscio de homo estas pekoj – ne de individuo, sed de socio permesanta, eĉ produktanta tiujn – ni aplaŭdu al la deklaro kaj postulu, ke ĝi estu serioza.

*Tuomo Grundström*

(Pri la supraj temoj Kalle Kniivilä verkis en sia blogo svede: <http://www.kniivila.net/2011/sannfinlandare-kopplas-till-brevik/>

kaj esperante: <http://www.kniivila.net/2011/brevik-hantas-verajn-finnojn/>

Legu kaj komentu.)



Grupfoto de la 70a Hispana Esperanto-Kongreso en la kulturdomo de San Lorenzo de El Escorial. (Foto: RB)

Georgo Camacho kaj Renato Corsetti haveblas pli detala filmo en la Youtube-kanalo “Ekstretoj” de Miguel Gutierrez Aduriz, alinome Livven Dek.)

Tuttaga ekskurso gvidis al la iom malpli varma fama urbo Avila, kiu estas parto de la monda kulturheredo pro sia mezepoka urbomuro kun fortikaj turoj kaj la katedraloj, devenloko de la konata Teresa de Avila.

Kongresejo estis la kulturdomo de Sankta Laŭrenco, apud la fama kaj grandioza monaĥejo El Real, kiu estis ankaŭ palaco de Filipo Ila,

kun famaj pentraĵoj de Goya, flandraj majstroj kaj biblioteko kun valoraj manuskriptoj.

Vesperaj babiloj kaj kunmanĝoj en apudaj terasaj restoracioj kompletigis la familietosan aranĝon. Mi dankas pro la interesaj spertoj kaj konatiĝoj kun tiom sindediĉaj aktivuloj de la hispana kaj kataluna movadoj. Dankon al la kongresa komitato kaj mia gastiganto Manolo Pancorbo, kiu per sia grupo Sínkopoj plie kontribuis al la muzika programo, krom ia. Kimo, Georgo kaj bona plektorkestro.

*Robert Bogensneider*

## Impresoj pri la UK en Kopenhago

Post kvinjara paŭzo mi decidis partopreni en la Universala Kongreso, kiu ĉi-jare estis organizita en Kopenhago, Danio. Kun scivolemo mi atendis la eventon: pri la pasinta UK en Florenco, Italio mi ne multajn memorojn havas, kaj aldone mi antaŭe ne vizitis Kopenhagon.

Plejparte ĉio estis laŭ mia imago. En la programo aperis la kutimaj programeroj,



Supre: Kongrescentro Bella Center.  
Sube: Probal Dasgupta inaŭguras la kongreson.  
(Fotoj: Kalle Kniivilä)

kiujn mi partoprenis laŭ plaĉo kaj intereso. Min plej interesis la junulara programo, kiu okazis en la sama kongresejo. Junularo ja aktive organizis programerojn, kiujn eĉ ekster-TEJO-aĝaj partoprenis. Bona intergeneracia agado ĉarmas. Ekzemple dum pikniko en la parko Kongens Have partoprenis kelkaj “maljunuloj” kaj evidente dum la ekskurso al Kristiania amasis Esperantistoj, ĉu ene aŭ ekstere de la organizita ekskurso.

La kongresejo estis nova kongrescentro Bella Center. Ĝi estas okazejo kun multaj grandaj kaj malgrandaj haloj/ĉambroj, manĝejo-kafejo kaj eĉ 23-etaĝa hotelo. Speciala trajto de la hotelo estas, ke ĝi havas du oblikvajn turojn. Laŭdire la deklivo estas eĉ pli granda ol la deklivo de la fama turo en Pisa. La servoj en la kongresejo laŭ mia sperto enorde funkciis. En la ejo estis ankaŭ poŝtoŝtanco kaj eĉ sendrata retkonekto

por la uzo de la partoprenantoj. Ŝajnas al mi, ke moviĝo en Kopenhago bone funkciis malgraŭ tio ke Kopenhago estas grandurbo kaj ke la kongresejo situis sufiĉe for de la urbocentro kaj mia hotelo. Biciklado vere estas tre favorata kaj ŝatata transportmaniero en la urbo, sed ankaŭ tiel nomata publika transporto bone funkcias. Ĝenerale la urbo aspektis pura, trankvila kaj bonhumora al mi. La lokaj homoj sentiĝis afablaj kaj kutimintaj al eksterlandanoj. Neniu postrigardis strange aŭ miris, se ni parolis en fremda lingvo, sed eĉ male: ili venis alparoli kaj demandi, en kiu lingvo ni parolas kaj kiun flagon ni kunhavas, ktp. Homoj vere aspektis interesitaj kaj scivolemaj.

Pri UK aperis novaĵo eĉ dufoje en televido kaj en la urbo videblis reklambandero pri la evento. Min iomete surprizis, ke en la kongresejo ne videblis – se ne kalkuli unu Esperanto-



La ĝemelaj turoj de la kongrescentro Bella Center/ Bellasky-hotelo en suda Kopenhago. En la dekstrata turo, en la 23a etaĝo, troviĝas kafejo kun panoramo. (Foto: RB)



Pikniko en la parko Kongens Have. (Foto: Paula Niinikorp)



Supre:  
EAF sin  
prezentas al  
kongresanoj  
en Movada  
Foiro.  
(Foto: RB)

Sube:  
Kongresanoj  
sin prezentas  
al la publiko  
en Kopen-  
hago.  
(Foto: Natali)





flagon – kvankam ĉe-estas preskaŭ 1500 Esperantistoj. Nu, kompreneble ne estas kulpo de organizantoj, se ĉe la kongresejo ne eblas montri al hazardaj preterpaŝantoj pri sia ĉe-esto. Tamen mi iomete bedaŭras pri la afero. La kongresejo ja estas komerca entrepreno, kiu devus kompreni utilon de bona reklamado.

Preskaŭ ĉiutage pluvis kaj ventis dum la kongreso. Tio iomete malĝojigis mian humuron, sed ĵus spertinte la varmegon en Finnlando, mi tamen feliĉis, ke ne estis simila vetero en Kopenhago. Tia grizeca vetero kun malheliganta vespero donis almenaŭ al mi specialan etoson dum vizito en Tivoli post la nacia vespero (kiu ja okazis en la muziksalono de Tivoli). La lumaro en Tivoli aspektis des pli magia kaj ĉarma sub tiaj kondiĉoj. Finfine la semajno pasis tro rapide kaj vere spertindis la kongreso. Mi nur ĝojas, ke mi partoprenis.

*Paula Niinikorpi*



Urbestra akcepto en la urbodomo de Kopenhago. (Foto: RB)

## Terveisiä Esperanto-kongressista ja Kööpenhaminan kaupungilta

Sadat erimaalaiset vieraat saivat kutsun Kööpenhaminan kaupunginjohtajan vastaanotolle, joka järjestettiin 26.7.2011 ilahduttamaan Esperanton maailmankongressin osallistujia. Kaupungintalon upeassa juhlasalissa vieraita hemmoteltiin tarjoamalla tilaisuus jutella toisten kielen harrastajien kesken, mutustella hedelmiä, täytettyjä lettuja ja siemailia kylmiä juomia. Helle olikin melkein rasittava. Tulkkia ei tietenkään tarvittu muuten kuin kaupungin varajohtajan puheen kääntämiseen.

Kongressin teemana oli kulttuurien lähen-

tyminen eli se, että oppisimme ymmärtämään maailman eri kolkissa asuvia ihmisiä, iloitsemaan kansojen moninaisuudesta ja hyötymään siitä. Viikon ohjelmassa oli luentoja, diaesityksiä, ekumeeninen messu, teatteria, balettia, pantomiimia, Tivoli, järjestöjen ja liittojen kokouksia, konsertteja ja tietysti kirjamyyntiä sekä juhlalliset avajaiset ja päättäjaiset. Erityisesti jäi mieleeni diaesitys Grönlannista. Muiden luentojen aiheita olivat mm. ihmisen avaruustietämyksen lisääntyminen ja syventyminen, HIV ja sen ehkäisy, tietokoneavusteinen kääntäminen kielestä toiseen, lehtiartikkelien laatiminen, satuseppo H.C. Andersenin ihmisenä, heprean kielen elpyminen... Tietysti pidettiin myös esperanton kielen kokeita ja kursseja. Jo-

Sirkka Mattlin, franca kantisto JoMo kaj Raita Pyhälä en la urbestra akcepto. (Foto: Sylvia Hämäläinen)

kainen kongressilainen sai koota tästä runsaasta tarjonnasta mitä halusi ja ehti, mutta voi myös vain tapailla uusia tai vanhoja tuttuja, tutustua Tanskaan ja sen pääkaupunkiin, uida messissä ja retkeillä.

Esperanton maailmankongressi järjestettiin jo 96. kerran. Ensi vuonna se on Hanoisissa, Vietnamissa. Nyt pitopaikkana oli upouusi kongressikeskus Bella Center Kööpenhaminan Amager-saarella. Ympäriällä leviää rakentamaton laaja viheralue, kaupungin keuhkot. Viereissä kohoaa ihmeteltävä 23-kerroksinen vasta-avattu hotelli Bella Sky, jonka kaksi tornia kohoavat kierteisinä ja jalustaltaan leviten kohti pilviä. Bella Skyn näköalakahvilassa pidettiin Zamenhof Societon vastaanotto. Koetapa löytää Bella Sky ja Bella Center Googlesta! Näet hienoja valokuvia.

Ihmisille voit kertoa, että hakusana ”esperanto” antaa miljoonia osumia. Lars Forsmanin uuden kirjan (ilmestynyt syysk. 2010) nimi onkin *Esperanto... över 50 miljoner träffar*, mutta hän sanoi, että osumien määrä on jo kaksinkertaistunut. Jos kirja sattuisi sinua kiinnostamaan, tilaa se häneltä [larsespo@yahoo.se](mailto:larsespo@yahoo.se) tai Lars Forsman, Enbärsvägen 17, 69147 Karlskoga, Svedio.

Raita Pyhälä



Trajn' nenien – Fervojisto Jan Niemann de Kopenhago miras feliĉe pri la titolo de la nova albumo de Dolchamar. (Foto: Keke Uber)

## Valamo 2011: Esperantokurso denove internacie

Post unujara paŭzo EAF povis denove aranĝi Esperanto-kurson kunlabore kun la Popola Instituto de Valamo. La kursosemajno 13.–17.6. havis kaj tradiciajn kaj novajn erojn. Tre afable estis havi spertajn partoprenantojn, el kiuj kelkaj jam la trian fojon ĉeestis. Same afable estis konatiĝi kun novaj kursanoj, kiuj la unuan fojon spertis la mirindan atmosferon de monaĥeja areo.

La kurso komenciĝis jam dimanĉe vespere kun konatiĝo de la areo sub ĉiĉeronado de Jukka Laaksonen. Jukka gvidis nin krome dum la ekskurso al la monaĥeja tombejo, kompreneble ankaŭ esperante.

Lunde matene estis la unuaj lecionoj. La kur-

sanoj dividiĝis en grupojn de elementanoj kaj progresantoj, kiujn Atilio Orellana Rojas kaj mi vice instruis kaj gvidis. Entute ĉeestis 12 kursanoj.

En la elementa grupo estis partoprenantoj el Finnlando. Al la progressa grupo apartenis niaj eksterlandanoj: Ĵunko el Japanio, Kerstin el Svedio kaj Lydia el Estonio. Kerstin kaj Lydia jam pli frue estis en Valamo, por Ĵunko ĝi estis la unua fojo. Ŝi estis la unua el Japanio, kiu partoprenis en nia kurso, pri kio ni tre ĝojis. Ĉiuj havis kelkajn bazajn sciojn pri Esperanto, kaj ĉiun tagon ili lernis pli kaj certiĝis en uzo de la lingvo. Unu sinjorino eĉ ŝanĝis la grupon de elementa al la progressa. ▷



Valamo-kursanoj 2011. De maldekstre: Reetta, Aila, Anja, Kerstin, Atilio, Matti, Eeva Leena kaj Katri, sidante: Kerttu, Ĵunko, Riitta, Lydia kaj Tiina. (Foto: fotografisto Marta, projekta laboranto en Valamo)

La progresna grupo parolis pri diversaj temoj kaj multe komparis kutimojn kaj sciojn inter siaj landoj. Apartan spicon al la grupo donis niaj blindaj partoprenantoj, por kiuj necesis ekzemple pli konkreta priskribado de objektoj. Parto de la materialo estis brajligita.

Libertempa programo enhavis ekskursojn en la ĉirkaŭaĵo, komunajn vesperojn, i.a. saŭnavesperon. En la lasta vespero estis la jam tradicia festa vespermanĝo, kiu ĉiam same bone gustas.

Valamo akceptis nin same afable kaj mirinde kiel ĉiam. Ni kun Atilio rimarkis kelkajn ŝanĝojn, ekzemple la farbitan manĝejon, kies muroj nun estas bluaj. Sed la personaro de Popola Instituto kunlaboris kun ni kvazaŭ ni neniam forestus kaj la trankvileco kuŝis ĉie kiel antaŭe. Ni estis dankitaj pro la aranĝado de ĉi-jara kurso kaj kore bonvenigitaj por la venonta jaro.

Venu ankaŭ vi: la venontsomera kurso okazos 10.–15.6.2012.

*Tiina Oittinen*

Muminpaĉjo kaj Ĵunko. (Foto: RB)



## Frusomeraj ekskursoj en Turku-regiono

Esperantistoj en Turku-regiono povis eĉ dufoje viziti la kulturalan centron Logomo, kiu antaŭe estis riparejo de lokomotivoj, sed nun la ĉefekspoziciejo de la kultura ĉefurbo. Sub gvidado de niaj esperantlingvaj ĉiĉeronoj, Leena kaj Tiina, eblis konatiĝi kun la ekspozicio "Fajro, fajro!" En majo partoprenis deko de EST-membroj kun amikoj kaj en junio kune kun niaj eksterlandaj gastoj survoje al Valamo ĉeestis kvin. Ambaŭfoje la partoprenantoj spertis i.a. la plej grandan incendion de Turku, septembre 1827, kiu konkretiĝas en bruligita miniaturo-modelo.

## Antaŭekskurso al Naantali

Vendrede, la 10-an de junio, ni EST-anoj kun niaj eksterlandaj gastoj, Ĵunko el Japanio kaj Kerstin el Svedio, ekskursis al la Muminmondo de Naantali. Por multaj en nia 14-kapa grupo temis pri la unua vizito. La molaj Muminfiguroj akceptis nin brakumante kaj ni dividis la ĝojon de ĉeestantaj infanfamilioj. La bela naturo sur la insulo Kailo estas grava parto de atmosfero de Muminmondo. Estis interese kaj ekzote viziti padon en la flustranta arbaro, la Muminmonon kaj la ŝipon de Muminpatro kaj fine spekti senvortan teatraĵon. Kompreneble ankaŭ glaĉiaĵo estis aparte bongusta ĉe la Muminoj. Venontjare la partoprenantoj survoje al Valamo kaj kompreneble ankaŭ aliaj havos denove eblecon viziti la Muminmondon en Naantali. La antaŭekskurso okazos aŭ vendrede aŭ sabate antaŭ la kursosemajno. Bonvenon!

*Tiina Oittinen*

# Esperanto kaj alirebla kulturo por blinduloj

La 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis mezjulie en Olomouc, Ĉeĥio. La kongreson aranĝis la Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sub aŭspicio kaj kun financa apogo de Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj de Ĉeĥa respubliko. Ankaŭ la urbo Olomouc, vendejo de blindulhelpiloj kaj privata transporta entrepreno grave subtenis efektiviĝon de la kongreso. La cirklo fermiĝis: la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis en 1921 en Prago, en tiama Ĉeĥoslovakio. La 90-jara Esperanto-movado estis observata en la kongresa programo en prelegoj kaj muzeaj ekskursoj.

En kongresaj preparlaboroj gastigantoj efike utiligis informadikon por atingi ankaŭ viddifektitojn. La unuan fojon la kongresa programo kaj prezentoj aperis en retejo, skribe kaj aŭskulteble.

La kongreso allogis 60 partoprenantojn el 12 landoj. Dum la kongreso LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) okazigis kvar kunvenojn. Krom kunvenoj kaj prelegoj la programo konsistis el deko da ekskursoj, kaj la pinto estis la tradicia internacia vespero fare de kongresanoj mem.

## Aŭtoritata apogo al kongreso

S-ino Jana Melicháková, prezidantino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) konstatis en sia saluto al la kongreso, ke ŝi estas fiera pri ŝiaj aktivaj blindaj anoj de ĈEA, kiuj preparis la kongreson en Olomouc. S-ro Josef Stiborský siaparte konfirmis, ke la landa blindul-organizo (SONS) bone konscias, kiel longan kaj riĉan tradicion havas la Esperanto-movado inter blinduloj ĝenerale kaj en la Ĉeĥa respubliko speciale kaj kiel ĝi kontribuas al reciproka interŝanĝo

de spertoj kaj ĉiusepacaj informoj inter viddifektitoj. SONS aprezas, ke Esperanto ne nur ebligas, sed unuavice daŭre realigas kontaktojn inter nevidantoj en la tuta mondo. Esperantistoj interesiĝas pri kulturaj tradicioj kaj nuntempa realo en aliaj landoj. Tial SONS daŭre apogas la esperantistojn kaj subtenas per eldonado de la revuo Aŭroro kaj per helpo aŭ organizo de iliaj renkontiĝoj, kiel apogante la kongreson en Olomouc. En la inaŭguro ni aŭdis ankaŭ saluton de finna ambasadoro, Päivi Hiltunen-Toivio.

## Alirebla kulturo

La ĉeftemo de la kongreso estis "Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj". La temon enkondukis Nedeljka Lozajiĉ el Serbio kaj Antun Kovaĉ el Kroatio. Dum diskutado oni konstatis, ke strebo al plibonigado de ebligo percepti kaj ĝui diversajn kulturajn aranĝojn kaj objektojn por viddifektitoj estas ĝenerala.

Alireblecon ni spertis mem dum vizitoj kaj ekskursoj en Olomouc kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo. En Olomouc troviĝas palpebla modelo de la historia parto de la urbo, ankaŭ kelkaj preĝejoj havas modelojn, kaj tekstojn brajle kaj larĝpresite. Ni konatiĝis kun ekleziaj objektoj en palpebla ekspozicio, supreniris al sonorilejo en la katedrala turo kaj konatiĝis kun sonorilteknikoj, aŭskultis sonoradon kaj vizitis ĉefdiocezan muzeon. Promenadoj kaj senpagaj veturadoj sur la tramvojoj donis ioman konon de la ĉiutaga vivo en Olomouc, kaj enloĝantoj ricevis pruvon pri taŭgeco de Esperanto kiel komuna lingvo inter homoj el diversaj landoj.

Muziko estas esenca parto de kongresoj, do muzikon ni ĉiutage aŭdis: Sankta meso en Esperanto en la preĝejo de sankta Miĥaelo, koncerto en la katedralo de sankta Venceslao, gitar-



Mirmekofago estas ja granda por porti, pensas Andrzej Bartynski. Tetsuzi Tanaka kaj Pier Luigi Da Costa apud Elina Galytska atendas por karesi strangan beston. (Foto: Miroslava Tomechková)

koncerto en monaĥeja muzeo, kantanta fontano, violono ĉe la Esperanto-monumento kaj Esperanto-arbo de la jaro 1932 en la plej granda parko de urbo, kornorkestro dum vespermanĝo en ĉasista kabano en arbaro, kaj internacian muzikon en la arta vespero.

### Inteligenta haltejo

En la urbo Olomouc troviĝas 60 t.n. inteligentaj haltejoj. Vidhandikapito povas per propra, en mano aŭ en tenilo de blanka bastono troviĝanta elsendilo en formo de skatoleto komuniki kun publikaj trafikiloj. La aparato havas kvar klav-

ojn. Pere de la unua klavo aŭdiĝas la nomo de haltejo, pere la dua alventempoj kaj iliaj linioj kaj direktoj. Pere la tria klavo de la aŭdigilo lokita sur trafikilo aŭdiĝas numero kaj direkto de linio de alvenonta trafikilo kaj anonco, ĉu alvenonta trafikilo estas senbariera. Se blindulo volas uzi ĝin, tiam li/ŝi premas la kvaran klavon. Ŝoforo ricevas informon kaj malfermas pordon.

Ĉiuj trafikiloj en Olomouc estas ekipataj per menciita sistemo. Simile ekipataj estas trafikiloj preskaŭ en la tuta Ĉeĥio. Inteligentaj haltejoj estas instalitaj ĝis nun krom en Olomouc

en kelkaj aliaj urboj. En Prago trovigas kelkaj haltejoj en unu kvartalo. Elsendiloj estas utiligeblaj ankaŭ por trovi enirejon de gravaj lokoj (stacidomo, oficoj, kulturaj aranĝoj, ŝtuparoj, kaj eskalatoroj en metroo ktp).

### **Muzeoj, fortikaĵoj, ekzotikaj bestoj**

Tuttaga ekskurso venigis kongresanojn suden al la urbo Brno, kie ni vizitis teknikan muzeon kun blindula kulturo. Ni aŭdis prelegon pri K. Em. Macan kaj pri la 90-a datreveno de la unua internacia kongreso de blindaj esperantistoj en Prago 1921. En la muzeo ni konatiĝis kun la ekspozicio de muzikmaŝinoj kaj grandegaj gurdaj.

Dum la vojo al la monumento de paco sur baltkampo ni aŭdis referaĵon pri la batalo de tri imperiestroj en 1805. Ni vizitis koncertsalonon, kie imperiestroj subskribis packontrakton.

En historia armea fortikaĵo eblis provi kaskojn, palpi diversajn pafilojn kaj uniformojn.

En la vendejo de blindulhelpiloj ni konatiĝis

kun lerneja kuirejo, skribmaŝinoj kaj multnombraj aĉeteblaj helpiloj. Precipe blankaj bastonoj bone vendiĝis.

Dum la lasta tago post kunvenoj kaj antaŭ la fermo kaj arta vespero ni havis tempon viziti bazilikon sur Sankta monteto kaj bestĝardenon. En la bestĝardeno al ni estis rezervata aliro al lokoj, kiujn ordinaraj vizitantoj ne povas viziti. Viddifektitoj povis karesi ekz. lamojn, kaprojn, turdon, bradipon, eĉ porti ĉe la brusto mirmekofagon. Kamelo scivoleme ofertis kapon por karesoj. En la lasta loko la plej kuraĝaj ricevis sur kolon dikan, dumetran serpenton. Neniu strangoliĝis.

### **Kantanta kongreso**

Estas prezentita deziro, ke sekva internacia kongreso de viddifektitoj estu kantanta kongreso. Ĉu eblus kompili koruson el gejunuloj el diversaj landoj?

*Ritva Sabelli*

## **Festivalo de edzinportado**

EAF partoprenis laŭplane en la festivalo de edzinportado. Unue okazis grupa konkurso, en kiu 3 viroj sinsekve portis la saman virinon. Nia grupo de hura-anoj sidis en la rigardejo kaj flirtigis la verdan flagon. La grupo estis intervjuita de loka gazeto.

Post ĉiu etapo la portanta viro devis trinki unu botelon de akvo antaŭ ol la sekva viro povis daŭrigi. En la unua etapo estis akvobaseno, kiun la paro devis trapasi, en la tria du altaj bariloj. La dua etapo estis la plej longa, sed sen apartaj obstakloj. Nia teamo brave trakuris kaj atingis la 7an lokon inter 9 teamoj.

Malfeliĉo okazis dum la unua etapo, kie de la portanta viro estis difektita la krura muskolo. Malbonŝance li estis nia konkuranto por la para konkurso, kiun nia teamo sekve ne povis

partopreni. Ni ĉiuj sidis kune en la rigardejo kaj hurais al la aliaj konkurantoj kaj denove multe flirtigis la flagon.

La gajninta paro venis el Finnlando kaj trapasis la kurejon de 250 metroj en 1 minuto.

Vesperoj pasis amuze en la bienejo de Onni Kauppinen. Malgraŭ la malafablaj okazaĵoj ni ĝuis la estadon en la bela finna naturo. Kvankam ni estis iom malbonŝancaj, ni tamen estis kontentaj pri la partoprenado. Ĝi rezultigis almenaŭ unu intervjuon en loka gazeto, Iisalmen Sanomat, kaj Esperanto sufiĉe multe videblis surloke. Dankon al Onni kaj al Timo Pirinen pro la intervjuo de ni ĉiuj!

*Tiina Oittinen  
sekretario de EAF*

## **La kopenhaga UK estas fermita, Hanojo kaj Rejkjaviko atendas**

Sabaton, la 30-an de julio, finiĝis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago (ĝis la inaŭgura tago aliĝis 1450 kongresanoj) per la Solena Fermo, kiun gvidis la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta. Ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak faris resuman raporton pri la laboraj, klerigaj kaj kulturaj programeroj, kiuj disvolviĝis dum la kongresa semajno. D-ro José Antonio Vergara, kiu reĝisoris la traktadon de la kongresa temo, ligita al la Internacia Jaro de Junularo, legis la kongresan rezolucion, en kiu kristaliĝis la konkludoj el tiu traktado.

Estraranino Claude Nourmont anoncis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj kaj Oratora Konkurso. Estrarano Amri Wandel disdonis diplomojn pri elstara agado al ok meritplenaj movadanoj kaj diplomojn pri elstara arta agado al kvar kulturaj agantoj. Estraranino Maritza Gutiérrez anoncis la ricevantojn de la subvencio Cigno kaj transdonis la "esperantistan pacpremio", Premio Deguĉi, al s-ro HORI Jasuo el Japanio. Estraranino Loes Demmendaal transdonis diplomojn pri 50-jara kaj 40-jara senin-

terrompa membreco en UEA.

Post la ferma festparolado de prezidanto Dasgupta la partoprenantoj de la Internacia Infana Kongreseto ĝojigis la publikon per du kantoj. Poste la LKK-prezidantino Ileana Schroeder kaj Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães invitis sur la podion la LKK-anojn kaj la helpantojn, kiuj ricevis rozon kaj fortan aplaŭdon de la dankema kaj evidente tre kontenta kongresano.

Fine sekvis la transdono de la kongresa flago, kiun el la manoj de s-ino Schroeder akceptis la prezidanto de LKK de la 97-a UK, s-ro Nguyen Van Loi, kiu kore bonvenigis la kongresanojn post unu jaro al Hanojo. Pli frue, Barbara Pietrzak anoncis la decidon de la Estraro de UEA, ke la 98-a UK en 2013 okazos en Rejkjaviko, 36 jarojn post la antaŭa UK en la islanda ĉefurbo.

Post la komuna kantado de "La Espero" sub la gvido de la Internacia Koruso kaj ĝia estro Alan Bishop la prezidanto de UEA deklaris la 96-an UK fermita.

---

## **Premio Onisaburo Deguĉi al HORI Jasuo**

La Estraro de UEA aljuĝas la Premion Onisaburo Deguĉi por agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en la Jubilea Jaro de Esperanto en 1987 per donaco de Oomoto kaj konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

Ĉi-jare la Premion Deguĉi ricevas HORI Jasuo el Japanio pro multjara agado por konigi la japanan kulturon tra la mondo per prelegvojaĝoj, artikoloj kaj libroj, inter kiuj elstaras lia

almanako "Raportoj el Japanio", aperinta jam en 14 volumoj ekde 1997. Krome, ĉi-jare oni povis preskaŭ ĉiutage legi en Esperanto liajn retajn raportojn pri la vivo post la tertremo, cunamo kaj atomcentrala katastrofo okazintaj en marto en lia lando.

## **Subvencio Cigno en 2011**

Subvencio Cigno estis starigita per donaco de la japana esperantista mecenato Etsuo MIYOSHII por subteni Esperanto-projektojn en la Tria Mondo kaj la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝi valoras 500 000 enojn, t.e. ĉirkaŭ 4500 eŭroj.



Ĉi-jare la Estraro de UEA dividis la subvencion inter tri ricevantoj:

**Fondaĵo Ameriko** por vojaĝkostoj lige kun la 8-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en San-Paŭlo, Brazilo, kaj por eldono de lernomaterialoj por hispanlingvanoj;

**Esperanta filmfestivalo** lige kun la 8-a TAKE; kaj

**Dokumenta Esperanto-Centro** en Durdevac ĉe Zagrebo, Kroatio, por plibonigi siajn materiajn kondiĉojn kaj pligrandigi siajn kolektojn.

## Diplomo de UEA al 12 Elstaraj Agantoj

En la inaŭguro de la 96-a UK oni anoncis la nomojn de tri novaj Honoraj Membroj de UEA. Alia formo de honorigo en UEA estas la **Diplomoj pri Elstara Agado** kaj **Elstara Arta Agado**. Ĉi-jare la Estraro decidis distingi per diplomo 12 Esperanto-aktivulojn.

Diplomo pri Elstara Agado: **Jorma AHO-MÄKI** el Finnlando, vicrevizoro de EAF, pro elstara loka agado kaj gazetara informado pri

Esperanto; Augusto CASQUERO el Hispanio pro instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio; Helmar FRANK el Germanio pro elstara antaŭenigo de Esperanto kiel lingvo de scienco, precipe pere de la Akademio Internacia de Sciencoj; Francois Xavier GILBERT el Francio pro longtempa gvidado de la Koresponda Servo Mondskala de UEA; Heidi GOES el Belgio pro sukcesa agado por disvastigo de Esperanto en Indonezio; Mireille GROSJEAN el Svislando pro laboro por Esperanto en Afriko kaj utiligo de Esperanto por interkultura edukado; Andrzej GRZEBOWSKI el Pollando pro antaŭenigo de turismo per Esperanto kaj pro agado sur la kleriga kampo; Geza KURUCZ el Hungario pro modela redaktado de la revuo Juna Amiko;

Diplomo pri Elstara Arta Agado: Kim HENRIKSEN el Danio kaj Jean-Marc LECLERC (JoMo) el Francio pro longtempa kontribuo al la Esperanto-muziko; Carmel MALLIA el Malto kaj Abel MONTAGUT el Katalunio pro elstara kontribuo al la Esperanta poezio.

*[laŭ Gazetara Komunikado 424]*

---

## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2011

### Poezio

Unua premio: Jorge Camacho Cordón (Hispanio) pro “Sezonoj”; Dua premio: Ulrich Becker (Usono) pro “Adiaŭna festo”; Tria premio: Jorge Camacho Cordón pro “Lokoj”; Honora mencio: Aleksandro Mitin (Rusio) pro “Vivhorloĝo”. Partoprenis 43 verkoj de 18 aŭtoroj el 14 landoj.

### Prozo

Unua premio: ne aljuĝita; Dua premio: Sten Johansson (Svedio) pro ”Brokante”; Tria premio: Sten Johansson pro ”Nova amiko de Sinjoro Brunner”; Honora mencio: Ulrich Becker pro ”Malapero de knabo”. Partoprenis 20 verkoj de 13 aŭtoroj el 10 landoj.

### Eseo

Premio “Luigi Minnaja”: Davide Astori (Italio) pro “La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planado”; Dua premio: Jan Werner (Slovakio) pro “Konfuzigaj faktoroj en lingva komunikado”; Tra premio: Filippo Franceschi (Italio) pro “Post legado de ‘La mava lingvo’”; Honora mencio: Adrienne Pásztor (Hungario) pro “Tutmondaj defioj de la klimatsanĝiĝo”. Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 3 landoj.

### Teatraĵoj

Unua kaj dua premioj: ne aljuĝitaj; Tria premio: Doron Modan (Israelo) pro ”Justa juĝo”; Honora mencio: João José Mendes Quiterno dos Santos (Portugalio) pro ”Aŭtodafeo”; Ho-

nora mencio: Georgo Handzlik (Pollando) pro "Kompleta (preskaŭ) historio de Universalaj Kongresoj de Esperanto". Partoprenis 8 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj.

### **Kanto**

Premio "An-okin pri Kanto": ne aljuĝita; Dua premio: Rogerio Borges kaj Eric Languillat (resp. muziko kaj teksto; Francio) pro "Tatua Papili"; Tria premio ne aljuĝita. Partoprenis 4 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

### **Filmo**

Unua premio: Roman Dobrzyński (Pollando) pro "Japana pritempo – Oomoto 2009"; Dua kaj tria premioj: ne aljuĝitaj. Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

### **Infanlibro de la jaro**

"Avo Paŭlo", verkita kaj eldonita de Margrit Vollertsen-Diewerge, trad. Pit Hauge (Germanio). Partoprenis 5 verkoj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

[laŭ GK 423]

---

## **UEA ricevis 3 novajn honorajn membrojn**

En sia kunsido sabaton, la 23-an de julio, en Kopenhago la Komitato de UEA elektis tri elstarajn movadanojn kiel Honorajn Membrojn de UEA. Ili estas d-ro Detlev Blanke el Germanio, d-ro Renato Corsetti el Italio kaj s-ro Rob Moerbeek el Nederlando.

**Detlev Blanke** (nask. 1941) estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR 1968–1980 kaj ekde 1981 de Esperanto-Asocio de GDR. Li doktoriĝis en 1976 per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana, kaj habilitiĝis en 1985 per disertacio pri planlingvoj ("Internationale Plansprachen"). En 1988 li fariĝis docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato. Ekde 1976 li estas estrarano de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kies bultenon "Informilo por Interlingvistoj" li redaktas ekde 1992. Ekde 1992 li kompilas (kun H. Tonkin) bibliografion pri Esperanto kaj interlingvistiko por la usona Modern Language Association. Li iniciatis la Esperantologiajn Konferencojn, kiuj okazas ekde 1978 en ĉiu UK. Kun sia edzino Wera li laboras i.a. pri terminologio kaj iniciatis la fondon de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA en 1987.

**Renato Corsetti** (nask. 1941) laboris dum la unua parto de sia vivo en banko kaj poste en la Universitato de Romo. Li estas aktiva en la Esperantomovado ekde la fino de la 1960-aj jaroj. Prezidanto de TEJO li estis 1971-1973, poste honora prezidanto. Li estis estrarano de UEA 1980-1986, vicpre-

zidanto 1998-2001 kaj prezidanto 2001-2007. Corsetti membris en multaj komisionoj de UEA kaj estis prezidanto 1980-1986 kaj vicprezidanto ekde 2002 de Instituto Hodler '68. Estrarano kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio li estis dum pluraj periodoj. Membro kaj sekretario de la Akademio de Esperanto li estas ekde 1999. En 2008 li ricevis la Premion Deguĉi. Li aŭtoris aŭ redaktis multajn librojn kaj artikolojn. En sia agado li aparte interesiĝas pri la disvastigo de Esperanto al ĉiuj kontinentoj kaj pri ĝia utiligo por certigi la lingvajn homajn rajtojn je ĉiu nivelo.

**Rob Moerbeek** (nask. 1936) laboris 32 jarojn kiel oficisto de UEA zorgante pri la ekspedofako de la Centra Oficejo kaj pri provlegado de "Esperanto" k.a. periodaĵoj kaj eldonaĵoj de UEA. Li prizorgis ankaŭ la Bibliotekon Hodler kaj la arkivon de la CO. Post emeritiĝo en 2001 li laboras volontule en la CO. Li korektas ankaŭ la revuojn "Monato", "Internacia Pedagogia Revuo", "Scienca Revuo", "Fen-x" (E-o Nederland), "Esperantista Vegetarano", "La Kontakto" (nederlanda LIBE-sekcio), k.a. Agado por handikapuloj, precipe blinduloj, estas proksima al li. Li prizorgas voĉlegadon de "Esperanto" k.a. revuoj por blinduloj. Ekde 2001 li reprezentas Ligon Internacian de Blindaj Esperantistoj en la Komitato de UEA. Li estis privatdocento pri E-o ĉe la Universitato de Amsterdamo 1978-1998. En 2000 li ricevis la Premion Deguĉi.

[laŭ GK 422]

## VIKIMANIO = Internacia vikipediista renkontiĝo

Vikimania estas unika internacia renkontiĝo de kontribuantoj al esperanta Vikipedio omaĝe al ĝia dekjariĝo. Ĝi okazos en Svitavy de la 26-a ĝis la 30-a de oktobro. La partoprenantojn atendas prelegoj, seminarioj, laborgrupoj, instrukcionoj por komencantoj, kultura programo, sed ankaŭ urbotrarigardo kaj ekskurso al ĉarma proksima renesanca urbo Litomyšl troviĝanta en la Unesko-listo de kulturheredaĵoj. Detalajn informojn vi trovos ĉe <http://www.vikimania.estranky.cz/> aŭ skribu al [evikimania@gmail.com](mailto:evikimania@gmail.com)

[el ĈEA-cirkulero]

## Eventokalendaro de EAF

### 2011

10.–11.9. Aŭtunaj Tagoj de EAF en Tornio–Haaparanta–Pajala  
17.12. Malfermaj pordoj en la oficejo de EAF

### 2012

en marto Vintraj Tagoj de EAF en suda Finnlando  
8.–9.6. Antaŭekskurso de kursosemajno (Naantali, Turku)  
10.–15.6. Esperantokurso en Popola instituto de Valamo  
28.7.–4.8. UK en Hanojo, Vjetnamio  
ILEI-konferenco en Kunming, Ĉinio  
IJK sur Okinavo, Japanio

## Eventoj en la mondo

27.–30.9.2012 Trilanda konferenco – Komuna konferenco de austraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/trilanda-konferenco-443.html> aŭ [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)

## ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF  
10.–11.9.2011 en Tornio/Haparanda-Pajala.  
Nomo \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Tel./Fakso/Ret-adreso \_\_\_\_\_

## Aliĝkotizo:

22 e \_\_\_\_\_

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

## AT-paketo

inkl. tranoktadon en hotelo Tornion Kaupunginhotelli, manĝojn (lunĉo, kafo kaj vespermanĝo sabate, tagmanĝo dimanĉe), rondveturon en Tornio-Haparanda kaj ekskurson al Pajala

en 2-lita ĉambro 180 e \_\_\_\_\_

en 1-lita ĉambro 215 e \_\_\_\_\_

Pri vojaĝo al Tornio kaj reen bv. legi en la teksto.

## Entute pagenda al la konto de EAF \_\_\_\_\_

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825 (FI11 8000 1700 2308 25, BIC: DABAFIHH). Bv. uzi la ref.n-ron 4640 (sen pliaj aldonoj).

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki  
Retaj aliĝoj tra [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

**ILMOITTAUTUMISLOMAKE**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton  
syyspäiville 10.–11.9.2011 Torniossa  
Nimi \_\_\_\_\_

Osoite \_\_\_\_\_

Puh./fax/sähköposti \_\_\_\_\_

**Ilmoittautumismaksu:**

22 e \_\_\_\_\_

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä.  
Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suo-  
men ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen  
mukaan.

**AT-paketti**

sis. yöpymisen Tornion kaupunginhotellissa,  
ruokailut (lounas, kahvi ja illallinen lauant.,  
lounas sunn.), kiertoajelun Torniossa ja ret-  
ken Pajalaan

2-hengen huoneessa 180 e \_\_\_\_\_

1-hengen huoneessa 215 e \_\_\_\_\_

Matkajärjestelyt Tornioon ks. teksti.

**Maksut yhteensä** EAF:n tilille \_\_\_\_\_

Tilinumero: Sampo 800017-230825.

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja  
maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia:

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki  
tai tiedot s-postitse [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi)

# Aütunaj Tagoj en Tornio– Haparanda–Pajala

## Syyspäivät pohjoisessa 10.–11.9.2011

*Laponia lumo – Lapin valo*

Al niaj nordaj Aütunaj Tagoj aliĝis ĝis nun du-  
deko da partoprenantoj. Jen la programo kaj  
informoj pri la trajnoj el Helsinki/Turku tra  
Tampere. Kompreneble eblas vojaĝi al Tornio  
ankaŭ alimaniere, ekzemple per propra aŭto. Se  
vi havos tempon, restu iom pli longe, ĉambroj  
mendeblas en la hotelo *Tornion Kaupungin-  
hotelli* ankaŭ por pluraj noktoj. Vi povas ankoraŭ  
aliĝi, sed bonvolu rapidi.

*Syyspäiville voi vielä ilmoittautua, mutta pidä  
kiirettä. Tähän mennessä mukaan on lähte-  
mässä parikymmentä henkilöä. Tässä ohjelma  
junayhteyksineen, mutta toki Tornioon pääsee  
muutenkin. Jos sinulla on aikaa, mikset pi-  
dentäisi oleskelua kummastakin päästä (jotkut  
ovat jo niin tehneetkin). Hotellihuoneen Tor-  
nion Kaupunginhotelliin voi tilata kauttamme  
useammaksi päiväksi.*

### **Vendredo / Perjantai 9.9.2011**

21.05/21.23 Ekveturo el Turku je 21.19 / Hel-  
sinki je 21.23 / Tampere je 23.59 per nokta  
trajno.

*Lähtö yöjunalla Turusta klo 21.19 / Helsin-  
gistä klo 21.23 / Tampereelta klo 23.59.*

### **Sabato / Lauantai 10.9.2011**

8.20 Alveno de trajno al stacidomo en Tornio,  
buso atendas (venu tien por rondveturo plej  
laste je la 9.15). *Juna saapuu Tornioon,  
bussi odottaa (kokoontuminen asemalla  
kiertoajelulle viimeistään klo 9.15).*

- 9.30 Duhora rondveturo kun ĉiĉerono en Tornio–Haparanda. *Tornio–Haaparannan kahden tunnin opastettu kiertoajelu.*
- 12.00 Lunĉo kaj enĉambriĝo en hotelo Tornion Kaupunginhotelli. *Lounas ja majoittuminen Tornion Kaupunginhotelliin.*
- 14.00 Prelego: Laponoj. *Luento Lapin alkuperäisasukkaista.*
- 15.00 Prelego: La plurlingvismo en Laponio kaj Nordbotnio. *Lapin ja Norrbottenin monikielisyys.*
- 16.00 Kafo. *Kahvi.*
- 16.30 Libertempo internacie: du ŝtatoj, duobla urbo. *Vapaasti ja kansainvälisesti: kahden valtion kaksoiskaupunki.*
- 19.00 Vespermanĝo en la hotelo. *Illallinen hotellissa.*
- 20.30 Vesperumo liberprograme. *Vapaamuotoista illanviettoa kaupungilla tai hotellissa.*

### Dimanĉo / Sundo 11.9.2011

- 8.30 Matenmanĝo en la hotelo. *Hotelliaamiainen.*
- 9.30 Ekveturo al tutaga ekskurso, celo Pajala. Lunĉo kaj kafo survoje. *Lähtö Pajalan retkelle. Lounas ja kahvi matkan varrella.*
- 18.00 Alveno al Tornio, tie vespermanĝo memstare (ne inkluziva). *Saapuminen Tornioon, illallinen omatoimisesti (ei kuulu pakettiin).*
- 21.19 Noktaj trajnoj al Helsinki/Turku. *Yöjunat Helsinkiin/Turkuun.*

### Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki, aŭ aliĝu rete al adreso [eafmendoj@esperanto.fi](mailto:eafmendoj@esperanto.fi). Samtempe pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron en la aliĝilo. **Notu, ke estas tre grave fari ambau: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon** por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la AT. La aliĝilojn kaj pagojn prizorgas Päivi Saarinen kaj Tiina Kosunen.

Notu: Al la trajna karavano aliĝu al Tiina Oit-

tinena, [eafsekretario@esperanto.fi](mailto:eafsekretario@esperanto.fi). Prezo estas proksimume 150 eŭroj (sen rabatoj) en nokta vagono. Tiina prizorgos la biletojn kaj kolektos la pagojn.

Por la demandoj pri programeraĵaj aferoj estos je via dispono ankaŭ Tuomo Grundström. Pri la hotelo kaj itinero dum la ekskurso vi povos turni vin al Tuomo aŭ al Tiina O.

### Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

*Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet. Ilmoittautumisista ja maksuista huolehtivat Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen.*

*Huom! Junamatkalle ilmoittaudutaan erikseen Tiina Oittiselle, joka hoitaa varaukset ja kerää maksut. Lisätietoja syyspäivien järjestyksestä saa myös Tuomo Grundströmiltä. Kaikki yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.*

### Lumoava Lappi ja Vittulanjätkä kutsuvat

Atendas vin la Laponia lumo kun ĉarmo kaj la fama Vittulanjätkä.



## ILEI konferencis

*En Kopenhago okazis Konferenco de ILEI 17.–23.7.2011. Ĝin partoprenis Synnöve Mynttinen kaj Sylvia Hämäläinen el Finnlando. Jen parto de la komunikado, kiun preparis la prezidanto de ILEI.*

Sukcese venis al fino la 44a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu elstaris kvante (103 aliĝintoj), kvalite (ĉ. 50 prelegoj, prezentaĵoj, diskutforumoj kaj laborgrupoj) kaj bunte – partoprenintoj el Indonezio, Nepalo, Ĉinio, Korea Respubliko, Ganao, Benino, Meksiko kaj Kubo. La Komitato kompletigis la estraron per elekto de s-ro Huang Yin Bao (trezoro) al la sekretaria poste-

no, akceptis sekcion el Meksiko, reprezentanton en Ganao kaj kontaktpersonojn en Indonezio kaj Nepalo. Kulmino de la semajno estis Simpozio organizita kune kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Fakultato de Humanistiko de la Universitato de Kopenhago kun la temo: "Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado."

*Stefan MacGill, prez. de ILEI*

***Foto el la interkona manĝovespero. Ĉiu kunportis ion el sia lando.***



## Stelsemantoj en la ora nordo

En Stokholmo *Katalin Kováts* lanĉis sian novan verkon ”Stelsemantoj” dum la printempa renkontiĝo de Sveda Esperanto Federacio. La verko vere meritis tian kortuŝan baptofeston en la sveda ĉefurbo en majo 2011. Al la nomo de la libro apartenas la epiteto ”Tiberio Morariu kaj liaj samtempuloj”.

Jam tuj dum la unua foliumado ekestis forta legemo kaj konatiĝo pri la vivofazoj de konata hungardevena rumano *Tiberio Morariu* (1901–1987), kies ĉefa stabejo dum lia agado kiel Cseh-instruisto situis en Svedujo. Tute nova, fascina mondo malfermiĝas antaŭ niaj okuloj, kiam ni sekvas tiutempan agadon en la movado. Nova ĉapitro pri Esperanto en Nordio varmigas mian koron kaj donas energion por lukti antaŭen sur mia propra vivovojo. Estas malfacile trovi trafajn vortojn por Katalin pro tre sukcesa agado kun la biografio de Tiberio Morariu. Indas tamen raportoj pri agado de Cseh-instruistoj. Jam 1960 mi ekkonatiĝis kun la metodo en Bruselo sub la gvidado de ĝia fondinto mem.

Flue kaj bele kuras la aŭtorina teksto en la libro. Leganto trovas multajn interesajn detalojn – por nuntempuloj ofte tute nekonatajn. Ankaŭ Morariu mem ricevis lokon kun siaj propraj verkaĵoj. Ili estas talente kaj belstille kreitaj. Ĉio en la nova eldonaĵo atestas pri vere aktiva agado dum la 30-aj kaj 40-aj jaroj. Ni povas hodiaŭ ĉerpi el la aktivado de la pasintgeneracio sekvindajn ekzemplojn ankaŭ por la hodiaŭa agado. Multajn konatajn agemulojn Katalin prezentas. En la sesdekaj jaroj mi apartenis al la kunlaborantaro de *Ernfrid Malmgren* (1899–1973). La verkojn de *Stellan Engholm* – originajn kaj tradukitajn – mi antaŭ jaroj avide konsumis. *Elisa Kehlet* – la filino de gesinjoroj *Weide* el Hamburgo ricevis ĉarmulinan rolon en la spertoj de Tiberio, kiu iam donis moneron al

ŝi. Elisa – tiam apenaŭ dujara – rapide krietis “mono”. Morariu estis ravita pro la esprimkapablo de ŝieto (bela kombinaĵo!) Ankaŭ nia konata Cseh-instruisto kreive uzis la Zamenhofan lingvon. Estas ĉiam tre agrable trovi tiajn lingvajn juvelojn en la teksto.

Dum la 30-aj kaj 40-aj jaroj Esperanto bele floris. Hodiaŭ ni havas velksezonon kaj la movado iel stagnas, kvankam en la reto ni vidas multajn pozitivajn fenomenojn. Tre kolore kaj trafe Katalin prezentas agadon de niaj antaŭuloj. Morariu atingis bonajn rezultojn, neniel li ŝparis siajn fortojn. Lia familia vivo certe suferis pro konstanta vojaĝado pro instrua agado. Mirinde rapide Katalin sukcesis kolekti bazan fontmaterialon por la verko kaj ĉion ŝi talente, belstile redaktis kaj libroforme distribuis al esperantistoj en Nordio kaj kompreneble al ĉiuj movadanoj en la tuta mondo.

Nur modeste mi kapablas prezenti ĉi tiun majstroverkon de la konata hungarino Katalin. Estas necese mem tralegi la libron kaj ĝui pri grandiozaj atingiĝoj de Cseh-instruistoj. Efike kunlaboris *Henrik Seppik*, *L. Friis*, *Elinjo Pähn* kaj multaj aliaj. Temas pri biografio, en kiu la teksto trovas kaj galopas flue. Al mi la verko estas enciklopedio pedagogia. Kiam propraj fortoj malpliĝas, mi havas jen bonegan vitaminpilolon. Indas resti kiel eble plej ofte ĉe la teksto kaj ripeti ĝin denove kaj denove. Katalin faris miraklon kreitan kun amo kaj ŝi lasis monumenton por nuntempuloj pri pasintaj oraj tagoj. Ne eblas preteriri, necesas tuj havigi la verkon por aktiva konsumado.

*Jorma Ahomäki*  
*En Bruselo 1960 diplomita*  
*Cseh-instruisto*

## Turun esperanton historia

Turun Sanomissa Jorma Ahomäki kirjoitti 15.3.2011 mielipidesivun Kirjoittajavieras-palstalla esperanton historiasta Turussa sekä tämän päivän kielen harrastuksesta. Sonkajärven eukonkannon maailmanmestaruuskisoissa oli mukana esperantistien joukkue. Iisalmen Sanomat mainitsee lyhyesti joukkueen kansainväliset kannattajat 3.7.2011 ilmestyneessä kilpailu-uutisessa.

Jorma Ahomäki kertoi nykyisen Turun Esperanto-yhdistyksen perustamisesta 1961. Puolan radion 1959 aloittamat esperantonkieliset ohjelmat vauhdittivat kielen harrastusta. Perustamassa oli tunnettuja turkulaisia, mm. akateemikko Yrjö Väisälä. Yhdistyksen 10-vuotisjuhlia vietettiin Turun linnan kuninkaansalissa. Puolan radion toimituspäällikkö Andrzej Pettyn on vierailut usein Turussa ja pitänyt myös esperantooppitunteja.

Esperantoa on harrastettu Turussa jo yli sadan vuoden ajan. Aikaisempia esperantisteja oli mm. G.J. Ramstedt.

Ahomäki kertoo, että nyt Turussa voi opiskella esperantoa kuudessa eri tasoisessa opin-  
topiirissä. Kaupunginkirjastossa on alan kirjal-

lisuutta ja lehtiä.

Puolan radio lopetti esperantonkieliset lähetykset. Kieltä voi kuitenkin kuunnella muilta kanavilta, mm. Vatikaanin radiosta, australialaiselta 3ZZZ-aseimalta Melbournesta sekä Kiinan Radio Beijingistä. Eurooppalaiset paikallisradiot lähettävät esperantolähetyksiä.

Kööpenhaminassa pidettävään esperanton 96. maailmankongressiin heinäkuussa lähti turkulaisia esperantisteja.

### Esperantistit eukkoa kantamassa

Iisalmen Sanomissa kirjoitettiin eukonkannon MM-kilpailusta. Jutussa esitellään useampi kilpailija ja kannustusjoukkue. Kannustajia on tullut ulkomailta, esperantisteja kannustavat juoksemaan unkarilaiset, japanilaiset ja mauretaniaiset. Timo Pirinen toteaa esperantistien juoksusta: Simple perfekta.

Unkarilaistaustainen Csányin perhe piti tapahtumaa ainutlaatuisena.

– Ulkomailla ei voi kokea mitään vastaavaa. Sitä paitsi suomalaiset ovat hauskaa kansaa, toteasi Árpád Csányi.

*Jukka Noponen*

---

## HORI Jasuo: Raportoj el Japanio 14

*Eldonejo Horizonte, 186p, plus mapo, historieto, statistikoj kaj kurtaj sciigoj pri la aŭtoro kaj liaj antaŭaj libroj. Eldonjaro 2011*

Ĉiu raportaro de Hori pritraktas la jaron antaŭ la eldono. Inter la temoj pri la 2010a jaro estu menciataj japana origina flaŭro, la sorto de sumoo, ekonomiaj efikoj de la sakuro-florado, japanaj ĵurnaloj. En ĉiu raportaro Hori prikomentas la ĵusajn politikon kaj politikistojn, eko-

nomion kaj sociajn problemojn en sia lando. Kiel jam en la antaŭaj raportaro, ankaŭ nun la raportaron pli distrigas kaj malpezigas rakontetoj pri la simplaj travivaĵoj de du amindaj etuloj en ordinara japana familio. La tekstoj taŭgas ankaŭ kiel legaĵoj por diskutrondoj. Precipe la sociaj temoj tuŝas samtipajn fenomenojn en la tuta mondo. La aŭtoro planas kompletigi sian serion per ses pliaj raportaroj, po unu jare. La tuto donos al ni riĉan fonton de pri-japania scio kaj kompreno.

*Raita Pyhälä*



## Kommunikointia kotona ja kaukana

Ruotsin opetusministeri Jan Björklund yllätti heinäkuun alussa esittämällä kiinan kieltä kaikkien yläasteiden ja lukioiden opetusohjelmaan. Ruotsalaisten automerkkien – Volvo ja Saab – valmistus on siirtymässä kiinalaisten käsiin. Ministerin mukaan tämän pitäisi toimia hälytyskellona. Kiina on vahva markkinamahti. Kaikki eivät liikemaailmassa puhu englantia. Arvioidaan, että opettajien rekrytointiin kuluu 10–15 vuotta. Luultavasti suunnitelman toteuttaminen ei tule olemaan aivan kivutonta.

Myös meillä keskustellaan koulujen kieli- valikoiman laajentamisesta. Yritykset kaipaavat lisää erityisesti espanjan, ranskan ja italian kieltä taitavia työntekijöitä. Venäjän opetusta ollaan jo tuomassa entistä enemmän Itä-Suomen kouluihin. Pakkoruotsia taas vastustetaan. Näihin haasteisiin vastaaminen ei ole aivan yksinkertaista. Kouluissakin tunnetaan monikielisyiden taakka tavallisessa luokkaopetuksessa. Kielipulmien takia lääkäreille tulee vaikeuksia hoitotyössä. Pienessäkin paikallissairaalassa saattavat potilaat puhua 60 eri kieltä. Kaduilla ja toreilla näyttää rasismi nostavan päätään, kun ihmiset eivät ymmärrä toistensa kieltä ja kulttuuria. Jotain radikaalia ratkaisua Ruotsin tapaan pitäisi etsiä.

Heinäkuun lopulla intialainen kielentutkija Probal Dasgupta julkisti kahdeksannen kirjansa ”Loĝi en homa lingvo” (Mondial New York 2011, 243 s.). Teos käsittelee kielitieteen ja fi-

losofian yhteistä tutkimussarkaa. Tekijä valaisee myös kielenkääntämisen problematiikkaa. Maallikkokin voi nauttia asioiden selkeästä esittämisestä ja huumorista. Professori Dasgupta suosittelee kielentutkijoille ja filosofeille esperanton käyttöä selventävän terminologian luomiseksi.

Intialainen kielentutkija korosti kieliopiltaan säännöllisen ja helposti opittavan esperanton merkitystä myös ystävyden kielenä. Jo vuosikymmenien ajan tavalliset ihmiset ovat rakentaneet tällä kielellä kulttuureja yhdistäviä siltoja. Tässä toiminnassa ei ole pienintäkään vivahdetta rasismista. Tunnettu julkaisusarja ”Itä-Länsi” saa syksyllä tänä vuonna uuden merkkiteoksen. Epos nimeltä ”Kertomus Kjeu’sta” julkaistaan Hanoissa, jossa esperantistit kokoontuvat maailmankongressiinsa 2012. Meidän Kalevalamme J.E. Leppäkosken kääntämänä on mukana tässä arvokkaassa joukossa. Kommunikoinnin kultaisen ohjeen esperantisteille kiteytti kielen luoja tohtori Zamenhof ensimmäisessä esperantokongressissa 1905 Ranskassa seuraavasti: ”Täällä ei ole koolla ranskalaisia englantilaisten kanssa, eikä venäläisiä puolalaisten kanssa, vaan ihminen kohtaa ihmisen.” Tämä ohje kantaa ja toimii meidän globaalissa maailmassamme tänäänkin.

*Jorma Ahomäki  
Tiedottamisesta palkittu kaarinalainen*

## Tute freŝa tria eldono de ”Esperanto elektronike”

La DVD-disko kun pli ol 7 GB da materialo celas prezenti Esperanton kun sia multflanka ”vizaĝo” – literaturo, muziko, vortaroj, ludoj, kongresoj, instruiloj, ... La menuo de la disko haveblas en 26 lingvoj (sur la kovrilo estas Esperanto kaj la angla). Ekde la unua apero antaŭ 5 jaroj E@I vendis ĉ. 12000 ekzemplerojn – la

nuna versio estas laŭeble malmultekosta por disdonaci al amikoj kaj interesigantoj ekzemple en informbudoj, bibliotekoj, kursoj ktp.

Jam pro ono de la enhavo indas mendi la diskon. La DVD haveblas ĉe EAF, ĉe SED (Satakunta Esperanto-domo) aŭ en kelkaj ekzempleroj dum la Aŭtunaj Tagoj en septembro. *RB*

## Kio estas hipofeo? Sciu kaj agu!

En la diskutejo EAF-agadas estiĝis diskuto pri la bero *tyrni/havtorn* kaj ĝia esperanta nomo. Kontribuis almenaŭ ok personoj, kaj troviĝis vorto: **hipofeo**. Ĝi kreskas nature marborde en pikilhava arbusto, bone defendas sin kontraŭ plukantoj. Pri la abundaj pozitivaj efikoj de la bero Bruno Lehtinen provizis ampleksan tekston en la diskutejo (finne, bela defio al studrondoj esperantigi); vidu ĝin ĉi tie (kaj aliĝu al nia yahoo-groups-diskutejo, se vi ankoraŭ tion ne faris):

<http://groups.yahoo.com/group/EAF-agadas/message/3403>

Sigrid Kivistö ne bezonas serĉi hipofeojn. Ŝi sendis la suban tekston. Sekvu la ekzemplon.

*Ni aĉetis antaŭ kvar jaroj tri plantetojn en la bazaro de Tallinn. En sekva jaro ne eĉ unu bero venis. Ni aĉetis tri pliajn – en la sekva jaro sur branĉo estis DU beroj. Ili maturiĝis kaj mi kun mia amiko povis ĝui de nia hipofeo. En la sekva jaro venis 7 beroj kaj ĉijare en tri arbustoj la branĉoj estas plenplenaj de beroj. Arbustoj kreskis en 4 jaroj de 40 cm al 180 cm. Tero estas normala ĝardenata tero, sed suna loko. Miaj estonaj amikoj ankaŭ kreskigas arbustojn kaj dum la tuta jaro manĝas 5 berojn po tago el frostujo kaj ili ne konas la vorton "gripo". La arbustoj ne postulas ian zorgadon. Ili nur kreskas. Devas esti vir- kaj virinseksaj plantoj. Ankaŭ en Finnlando oni vendas plantojn de hipofeo. Kun aŭtunaj salutoj al vi ĉiuj,*

*Sigi*

## Literatura Mondo estas legebla en interreto

Internacia Esperanto-Muzeo Vieno, IEMW ciferecigis plurdekon da presaĵoj el la frua epoko de Esperanto. Temas pri jarkolektoj de periodaĵoj kaj libroj, liberaj el vidpunkto de aŭtoraj rajtoj. En la materialo oni ne povas serĉi laŭ teksto, ili estas simplaj skanaĵoj sen signorekonigado, en bilda formato – sed oni povas legi ilin surekrane.

La verkoj estas elŝuteblaj ankaŭ en pdf-formato – se oni konas la germanan lingvon – ja la tuta retejo de tiu materialo estas bedaŭrinde nur germanlingva – sen Esperantlingva versio.

Adreso de skanitaj periodaĵoj: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>

- Amikeco. - 1925-1926 - Aŭstria Esperantisto. - 1924-1938 - The British Esperantist. - 1905-1939 - Casopis Ceskych Esperantistu. - 1908-1914 - Cosmoglotta (Serie B). - 1935-1948 - La dek-sepa. - 1910-1914 - La Esperantisto. - 1889-1895 - Esperanto. - 1905-1946 - Germana Esperantisto. - 1905-1935 - Informoj por la anoj de la Aŭstria Katolika Ligo Esperantista. - 1914-1932 - Internacia Bul-

teno. - 1914-1918 - Kosmoglott (Serie A). - 1922-1950 - Lingvo Internacia. - 1895-1914 - Literatura Mondo. - 1923-1938 - Pola Esperantisto. - 1906-1937 - La Revuo. - 1906-1913 - Rund um die Welt. - 1910-1914

Adreso de skanitaj libroj: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

195 libroj de 72 aŭtoroj, i.a.: Ahlberg Per, Anonym, Abesgus M, Aymonier Camille, Bachmaier Anton, Barabás Ábel, Beaufront Louis de, Beaumarchais Pierre Augustin Caron de, Beermann Ernst, Berthelot Paul, Boirac Emile, Bollack Léon, Bogusevic K., Bonto van Bijlevelt W., Büsch Johann Georg, Byron George Gordon Byron, Cart Théophile, Chapellier Paul, Couturat Louis, Devjatnin Vasilij N., Dreckschmidt Wilhelm, Eckhart Serafin Bernhard Wilhelm, Einstein Leopold, ..., Saphir Moritz Gottlieb, Schleyer Johann Martin, Shakespeare William, Stankiević V., Stephanus John William, Süßmuth John Joseph, Tolstoj Lev N., Uitterdijk Dreves, Villareal Federico D., Witteryck Antoon Jozef, Zamenhof Ludwik Lazar, Zeidlitz Otto W.

laŭ <http://www.ipernity.com/blog/bernardo/330927> – de Bernhard Pabst

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle:**

**Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti [ilkka.santtila@welho.com](mailto:ilkka.santtila@welho.com).**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki) [jukka.p@esperanto.fi](mailto:jukka.p@esperanto.fi) (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☐ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen) Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 ☐ [www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala. ☐ <http://esperantoulu.info/> [aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. ☐ [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (pj. [tapani.aarne@mbnet.fi](mailto:tapani.aarne@mbnet.fi)) ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☐ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi) ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☐ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoi-

tavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 14 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on aktiivinen esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu säännöllisesti. Ryhmän yhteystiedot: (Marti Pennanen) Esperantoklubo de Lahti, Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☐ [marti.pennanen@phnet.fi](mailto:marti.pennanen@phnet.fi)

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☐ [irja.miettinen@pp1.inet.fi](mailto:irja.miettinen@pp1.inet.fi), [jormato35@gmail.com](mailto:jormato35@gmail.com)

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

## ESPERANTOLEHTI ilmestyy vuonna **2011** aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	10.9.	15.9.	en oktobro
6	10.11.	15.11.	en decembro
1/2012	1.1.	15.1.	en februaro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paĝo 100 e 1/1 sivu/paĝo 50 e

1/2 sivua/paĝo 60 e 1/2 sivua/paĝo 30 e

1/4 sivua/paĝo 40 e 1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la

oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



*La urbodomo de Kopenhago. Tamen la banderolo ne bonvenigas al nia kongreso, sed al la samtempa mondĉampioneca konkurso de montaraj bicikloj. (Foto: Paula Niinikorpi)*

### **Seuraava numero ♦ Venonta numero**

Seuraava numero ilmestyy lokakuussa. Jutut 15.9.2011 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2011 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.

**Kopio Niini, Tampere 2011**